

PODA ESPERANTISTO

3 • majo — junio • 1971

Zł 6.—



VIVU LA 1 DE MAJO!

Kiel pli bone?

Skribi tiun ĉi felietonon inspiris min letero de s-anino Hella Sauerbrey el Berlino en GDR, sendita al la Esperanto-Redakcio de la Pola Radio.

„Bedaŭrinde — ŝi skribas — mi ne aŭdis la du-partan trarigardon de la esperantistaj eventoj en la 1970 jaro. Por mi mem la plej valora evento en la antaŭa jaro — skribis s-anino Sauerbrey — estis la esperantista GDR-renkontiĝo en Karl Marx-Stadt, ĉar mi povis konatiĝi kun aliaj samideanoj”.

En la daŭro de la letero s-anino Sauerbrey skribis: „Mia sveda korespondamiko partoprenis la kongreson en Vieno kaj juĝis jene: „la kongresoj sendube estas interesaj, sed mi pensas, ke tiu semajno ofte postulas tiel multe da aktiveco — kaj korpa, kaj anima — ke oni tutsimple laciĝas. Mi eĉ pensas, ke oni ofte ekhavas pli da valoraj impresoj en pli malgrandaj esperantistaj ferioj aŭ internaciaj kongresetoj”.

„Mi opinias — aldonis s-anino Sauerbrey al la vortoj de sia sveda amiko — ke la plej grava en tiuj ĉi renkontiĝoj estas, ke ili ebligas al ni konatiĝi kun aliaj esperantistoj, ke oni povas nodi novajn kontaktojn kaj pliprofundiĝi malnovajn, pridiskuti temojn, kiuj nin tuŝas”.

La problemo tuŝita de la germana aŭskultantino de la Pola Radio tute ne estas bagatela, kiel eble povus ŝajni unuavide. Des pli, ke da opinioj kiel la ŝia kaj tiu de ŝia sveda amiko — ĉiam estas pli multe.

Senduba fakto estas, ke la universalaj kongresoj ĉiujare organizataj de la Universala Esperanto-Asocio — fariĝis gigantaj aranĝoj. Sufiĉas rememorigi, ke la kongreson en Varsovio, en la 1959 jaro, partoprenis pli ol 3 mil personoj, la kongreson en Budapeŝto, en la 1965 jaro, jam pli ol 5 mil personoj. La kongresoj en la okcidentaj landoj ne altiras tiajn amasojn, sed ĉiuokaze la meza nombro certe estas ĉirkaŭ 2 mil partoprenantoj. Superflue estas akcenti, ke da tiel nombraj kongresoj estas tre malmulte en la mondo. Konsiderante la fakton, ke niajn universalajn kongresojn preparas grupeto da altruistaj personoj, escepte de la salajrata konstanta kongresa sekretario (kio ne signifas, ke li ne estas altruista), ke la kongresoj laŭ la financa flanko estas memsufiĉaj kaj plej ofte la konto de la enspezoj apenaŭ egalas aŭ foje iomete superas la konton de la elspezoj — oni povas konstati, ke la kongresoj, estantaj la plej granda manifestacio de la tutmonda esperantistaro, okazas kvazaŭ mirakle, dank' al samideana abnegacio, sindediĉo, entuziasmo.

Ĉu do la rezulto meritas la penon?

La partoprenantoj kutime ne ĝuas la kongresurbon. La publikaj ĝeneralaj kunvenoj de la Internacia Komitato de UEA, la belartaj konkursoj, la artaj prezentadoj, la fakaj kunsidoj (ĉi-lastaj pluraj samtempe) tiel ŝtopas la kongresan semajnon, ke la turisma flanko prefere estas iluzia. Kion diri do pri la komitatanoj kaj estraranoj de UEA? Ĉi tiuj en la kongresurbo konas nur la vojon el la hotelo al la kongresejo kaj reen.

Mi pensas, ke la gvidantoj de la movado iom post iom venas al la konkludo, ke estus taŭge ŝanĝi ion en la karaktero de la universalaj kongresoj. Ja estas neeble, ke ili ne rimarkas la fenomenojn de mi priskribitajn. Mi plene konscias, ke nenio povas pli impresi, esti pli alloga ol la ĉiujara solena malfermo kaj la salutoj de la registaraj reprezentantoj kaj salutoj de la reprezentantoj de la landaj esperantistaj asocioj. La manifestacia flanko de niaj universalaj kongresoj estas nedubebla. Bone. Kaj ĝuste eĉ nur al tiu ĉi aspekto mi limigus la universalajn kongresojn.

Do — krom la solenaj malfermo kaj fermo — ankoraŭ nepre la belartaj konkursoj, la oratoraj konkursoj, la teatraj prezentadoj kaj nepre sur pli kaj pli alta nivelo.

Por la ekstera publiko, por la lokaj kaj landaj televido, radio, gazetaro — la laborkunsidoj de la Estraro, de la Internacia Komitato, de la Esperanta Akademio, de la Somera Universitato, de la fakaj asocioj — ne havas valoron, ili tutsimple ne estas spektaklecaj, almenaŭ ne tiel, kiel ni volus, ke ili estu.

Ĉu do oni rezignu pri ili? Ĉu entute oni rajtas rezigni pri ili? Certe, certege ne! Do — kion fari?

Ĝuste la letero de s-anino Sauerbrey sufloras la solvon. En Eŭropo, kaj tiu ĉi kontinento plej ofte gastigas la universalajn kongresojn, estas pluraj aliaj atentindaj internaciaj aranĝoj esperantistaj. Ĉu ne estus utile, multege pli utile, ke la Esperanta Akademio — anstataŭ en Helsinko, Vieno, Londono — debatu, ekzemple, en Międzygórze, la pitoreska pola montara loko de la ĉiujara tradicia feriado esperantista? La akademianoj havus tie kvieton inda iliajn gravajn pripensojn kaj decidojn, ne premus ilin aliaj eroj de la universala kongreso, nek lacigus kunsidoj alispecaj (ja pluraj el ili estas krome funkciuloj en UEA aŭ en fakaj asocioj). Kaj aliflanke — kia evento estus en Międzygórze kunsido de la Esperanta Akademio! — kiu kunsido en Helsinko, Vieno, Londono estas nur unu el la multegaj eroj de la kongreso, observata de plenmano da plej eltenemaj kongresanoj.

Kial ne okazigi la kunsidon de la Internacia Komitato de UEA ekzemple en la kastelo Grésillon — kun la sama efiko, kiel tiu de la Akademio en Międzygórze?

Kial la ĉarma Primoŝteno ne fariĝu loko de la kunsidoj de kelkaj fakaj asocioj?

Kial Helsingør aŭ alia skandinavia seminaria loko ne gastigu la Someran Universitaton?

Fine, kial ne la landaj kongresoj ricevu ion el la splendoro de la Universalaj Kongresoj? Ekzemple la kunsidojn (escepte de la paskaj) de la Estraro de UEA?

Ĉiuj ĉi imagoj, kiujn mi formulis — ĉi tion mi konscias — povas eble ŝoki unuamomente, precipe la konservativemajn funkciulojn. Sed, oni provu sen antaŭjuĝoj, trankvile repensi, pripensi.

Ja al mia felietono mi donis la titolon: „Kiel pli bone?”

JERZY GRUM

La 11 de marto 1971 mortis veterano de la Esperantomovado, fama soveta sciencisto-lingvisto, membro de la Esperanta Akademio, prezidanto de la Esperanto-Komisiono de SOD, honora membro de nia klubo, prof. Evgenij Aleksjejeviĉ Bokarev. Ni funebras kaj kondolencas al la familio de la mortinto kaj al la tuta soveta esperantistaro. Okazis funebra kunveno de la moskvaj esperantistoj en la Centra Kulturdomo de Medicinistoj. Esperantistoj partoprenis amase la funebran solenaĵon. Omska, Novosibirska kaj aliaj Esperanto-Kluboj kaj apartaj esperantistoj esprimis siajn kondolencojn.

Iom pri la laborista Esperanto-movado en Pollando

Estas fakto, ke en la komenco de la internacia Esperanto-movado apartenis al ĝi plejparte la t.n. „mezaj” kaj „superaj” klasoj — inteligentularo, instruistaro, kaj ankaŭ scienculoj de alta rango. La pola laborista klaso kiel la tuto troviĝis tiam (jaroj 1887—1914) en mizero, ne konscia pri sia socia valoro, kaj nur malmultaj partoprenis la organizitajn politikan, sindikatan kaj kulturklerigan movadojn sub la gvido de socialistoj kaj komunistoj aŭ de aliaj revolucitendenciaj kleruloj.

Tia situacio regis en la tuta Eŭropo. Do ankaŭ sur la pola teritorio, dividita tiame inter tri malamikajn ŝtatojn: germanan, aŭstran kaj rusan.

La socialistaj organizaĵoj estis tro okupitaj pri la batalo por akiro de politikaj rajtoj, de pli mallonga labortago kaj pli grandaj salajroj por havi tempon por io alia, des pli por tiutempe kiel „ĥimero” traktata ideo de iu lingvo internacia.

En la adresaro de d-ro Zamenhof, enhavanta la nomojn de la unuaj mil simpatiantoj, kiuj deklaris skribe sian emon ellerni Esperanton, troviĝas ĉirkaŭ 300 poloj, kaj inter ili nur 2 nomoj de poste pli eminentaj socialistaj gvidantoj, nome Tytus Filipowicz, sociologo kaj publicisto kaj Feliks Perl, poste longjara redaktoro de la ĵurnalo „Robotnik” („La Laboristo”), organo de la Pola Socialista Partio. Sed neniam ili partoprenis la esperantistan movadon senpere, restis nur *simpatio* por la ideo de internacia lingvo, kiel ĉe plejmulto de la tiama pola progresema demokratia radikala inteligentularo.

La procenton de la veraj laboristoj, apartenantaj al tutnaciaj Esperanto-organizaĵoj en Pollando oni povas kalkuli je 1, plejmulte je 2—3%.

La solan escepton ni trovas en la urbo Krakovo, kie dum la XIII Universala Kongreso en 1912 estis eldonita de la pola socialdemokrata partio speciala broŝuro, propagandanta en la pola lingvo la neceson de unu helpa lingvo internacia por la tuta movado. En la samaj jaroj ekagis ankaŭ speciala laborista grupo esperantista en la najbara ĉeĥa Moravio, eldonanta eĉ la propran organon „Kulturo”, kun komence 100 kamaradoj, kiu ia, deklaris: „Nia unua celo estos praktika uzado de Esperanto en la servo por la internacia socialismo kaj — plue — enkonduko de novaj direktoj en la ĝisnunan evoluon de la esperantista movado, renaskiĝo de esperantismo per socialismo”.

Do la vera, *organizita* laborista Esperanto-movado devis atendi, ĝis renaskiĝos la pola ŝtato, definitive dispartigita en la 1795 jaro, t.e. ĝis novembro 1918. Jam en la jaro 1919 estis fondita en Varsovio aparta *unuecfrota* socialista organizaĵo esperantista fare de kamaradoj: Roman Kosicki, Kazimierz Domosławski, Józef Litauer, Hartmann, Kos kaj aliaj, kies nomojn ni bedaŭrinde ne memoras. Ĝi estis nomita esperante kaj pole: „Laborista Esperantista Societo Praca-Laboro”. Ĝi komencis viglan instruadon de Esperanto en laboristaj sindikataj organizaĵoj, ĉe politikaj partioj ktp. En la dua duono de la jaro 1920 mi aniĝis dank’ al k-do Kęsicki al tiu ĉi societo, laborante jam de post 1919 en la same unuecfrota laborista *kooperativa* movado socialista. Pro kompleta elĉerpiĝo de la vortaroj sur la pola libreja merkato, ni eldonis unue „Plenan fundamentan vortaron” en nia redakto, kaj poste komencis viglan laboron por starigo de filioj

en laboristaj medioj. Post pli ol 10 jaroj de la tiudirekta agado ni havis jam bone funkciajn filiojn en jenaj urboj kaj industricentroj:

- 1) Błaszki
- 2) Katowice
- 3) Łódź
- 4) Piotrków (ankaŭ laboro de „Laboranoj”)
- 5) Rawa Ruska
- 6) Sosnowiec
- 7) Staszów
- 8) Warszawa „Nordo” kaj „Sudo”; en la kvartalo

Żoliborz „Vitraj Domoj” de la Varsovia Loĝej-Kooperativo.

Dua grava eldonaĵo estis la „Adreslibro de Pollandaj Esperantistoj” (1931), kiu kune kun sia aldona „Bulteno” el la 1935 jaro respegulas la tuton de la tiama Esperanto-movado en Pollando, kune kun ĉ. 4800 adresoj.

Krome kunlaboris intime kun „Laboro” jenaj memstaraj lokaj Esperanto-societoj en industriaj distriktoj:

- 1) Będzin
- 2) Chorzów
- 3) Dąbrowa Górnicza
- 4) Królewska Huta
- 5) Mysłowice
- 6) Rozdzień — Szopienice

kaj aliaj, kiuj tendencis al kunfandiĝo kun la centra „Laboro”. Kune „Laboro” kaj la laboristaj grupoj kalkulis ĉirkaŭ unu mil membrojn. Fama estis la granda „Esperanta Ekspozicio” de la filio de „Laboro” en Lublin, kiu prezentis multajn milojn da ekspozitaĵoj en la Lublina Konsum-Kooperativo LSS, kiun vizitis pli ol 10 mil personoj.

Tiun kunfandiĝon kaj pluan evoluon de la revoluciema Esperanto-movado interrompis subite la tiama reakcia registaro, malpermesinte nian tutan agadon kaj konfiskinte ĉiujn dokumentojn de „Laboro” kune kun la protokola libro de la Ĉefa Estraro, kiu konsistis tiam el jenaj kamaradoj: d-ro Marek Wajsbłum, prezidanto, advokato Józef Litauer, vicprezidanto, Jan Zawada, ĝenerala sekretario kaj du aliaj estrarmembroj, plej verŝajne Józef Rosłonec kaj alia ne rememorata.

La membroj disiris al la aliaj legale ekzistantaj societoj, aparta grupo al la oficiala „Pola Esperanto-Asocio”, sur kies bazo ni fondis specialan „Esperanto-Eldon-Kooperativon”, kiu sukcesis antaŭ la milito eldoni la belan porjunularan libron „Ĉu ĝi estas nur fabelo?” de Jan Wolski, konata publicisto kaj fondinto de la laboristaj produktkooperativoj, nomataj hodiaŭ Kooperativoj de Laboro (Spółdzielnie Pracy).

K-do Litauer provis savi la situacion, legaliginte novan, Socialistan Esperanto-Societon, sed ĉar ĝi devis grupigi nur la membrojn aŭ simpatiantojn de la dekstra Pola Socialista Partio, do la komunismemaj kaj „Bund-emaj” esperantistoj (Juda Socialista Partio), ne aliĝis al ĝi kaj ĝi ne disvolvis iun ajn pli seriozan agadon. Komencis amasiĝi nuboj sur la politika ĉielo, la imperiisma politiko de Hitler minacis ĉiam pli la slavajn landojn kaj — la 1 de septembro en la 1939 jaro lia forta armeo atakis Pollandon, kiu estis post unu monato tute senliberigita.

Komenciĝis la dua mondmilito, dum kiu la hitleranoj murdis inter aliaj ankaŭ kelkajn milojn da esperantistoj, ĉar — laŭ ilia devizo — *la germana lingvo* devis fariĝi la internacia. Pereis preskaŭ ĉiuj restintaj membroj de la Zamenhofs familio, pereis Belmont en Varsovio, Pruski en Lublin kaj centoj da aliaj aktivuloj.

Kaj kiam post la 5-jara okupado ekstaris Pola Popola Respubliko, tiam denove laboristoj estis inter la unuaj, kiuj revivigis en Lublin, Krakovo, Varsovio kaj Katowice la esperantistan movadon. Kaj ni

ne plu estis devigitaj dividi tiun ĉi movadon je „dekstra” kaj „maldekstra”, je „laborista”, „burga” aŭ „neŭtrala”, ĉar la *tuta laboranta popolo* de Pollando — laboristoj, vilaĝanoj kaj inteligentuloj — fariĝis unu granda socialisma socio.

Pro tio ni fondis komence la Asocion de Esperantistoj en Pollando, alinomitan poste je la Pola Esperanto-Asocio, kies historiaj atingoj devas esti temo de aparta artikolo aŭ eĉ libro.

JAN ZAWADA

Maja marŝo

[Marsz majowy]

„W zieloność i kwiaty wiosenne odziany..”

Per verdo kaj floroj printempaj vestita
De l'maj' tag' unua alvenis;
En ĉiuj terpartoj subite la voĉon
Popolocéano ekprenis:

Ref. Hodiaŭ laboros neniŭ —
Ni homan indecon akiru,
Kaj tiun ĉi tagon por festo elektu
Kaj pezajn katenojn disŝiru.

Kaj la laboristo hodiaŭ nur ĝuas
La vidon de l'suno radia,
Do tagon dediĉas al ĝojo, amuzoj,
Ĉar festo ja proletaria.

Hodiaŭ laboros neniŭ — ktp:

Hej, fratoj! Hodiaŭ serenu la fruntoj!
Neniŭ el ni suferegu!
Kaj ĝoje forflugu al ni la momentoj!
Neniŭ hodiaŭ nin regu!

Hodiaŭ laboros neniŭ — ktp:

Silentas la radoj, ne muĝas maŝinoj —
Sur verdo ripozu ni gasta,
La ĉarma naturo animon fortigu,
Ĉar venas batalo jam lasta.

Hodiaŭ laboros neniŭ — ktp:



La mondo malnova elstreĉas jam fortojn
Kaj siajn fortigas altarojn,
Al nova aŭroro, potenca, terura
Perforte starigas ĝi barojn.

Hodiaŭ laboros neniŭ — ktp:

Sur nia standardo ruĝiĝas signalo:
Fratec', egaleco, libero!
Unua de majo por ni ĉiam estu
La tag' de l'popola afero!

Hodiaŭ laboros neniŭ

(el la „Proletaria Kantaro”, SAT).



JAN KLIMEK

TRAKTATO PRI LA FUNDAMENTOJ POR NORMALIGO DE LA RILATOJ PPR-GFR

Tiu ĉi traktato sendube apartenas al la plej gravaj aktoj de la postmilita Eŭropo.

Tial do prave la longdaŭraj interparoloj polaj-germanaj, la parafo, kaj poste la sepan de decembro 1970 j. la solena subskribo de la traktato fare de la ĉefministro kaj kanceliero de la respektivaj ŝtatoj troviĝis en la centro de la atento de la eŭropa kaj monda publika opinio.

La interparoloj inter la delegacioj de PPR kaj GFR okazis — kiel konate — rezulte de la iniciato de la pola flanko, kiu proponis al la okcidentgermana flanko normaligon de la reciprokaj interŝtataj rilatoj sur la grundo de agnosko de la definitiva karaktero de la pola okcidenta limo sur Odra kaj Nysa Łużycka fare de Germana Federacia Respubliko, samkiel faris tion en sia unua ŝtata akto antaŭ pli ol 20 jaroj la alia germana ŝtato, Germana Demokratia Respubliko.

Kiam la povon en Bonn atingis la nova ekipo, rezulte de la transformiĝoj en la socio mem de GFR, ekipo bazita je la koalicio SPD-FDP, gvidata de de W. Brandt kaj W. Scheel — tiu ĉi propono renkontis pozitivan reŝon, ĉar tiu ĉi registaro rompita kun la politiko de neagnoskado de la eŭropaj realaĵoj, kio estis tiel karakteriza por la registaroj de la kristana demokratio. Fariĝis eble ekligi kontaktojn kaj okazis la komunaj interparoloj inter la delegacioj, la pola kaj la germana.

Tiamaniere estis rompita la impaso inter ambaŭ landoj, en kiun enpelis Germanan Federacian Respublikon la laŭvicaj postmilitaj registaroj de CDU/CSU — starintaj sur la grundo de reviziismo, revenĝo kaj konstanta subfosado kaj negado de la politika-teritoria status quo en Eŭropo. Estas kompreneble, ke tia politiko ekskludadis normaligon de la rilatoj inter Pollando kaj GFR.

La elirpunkto por normaligo de la rilatoj estis kaj estas konfirmo de la definitiva karaktero de la ekzistanta pola okcidenta limo sur Odra kaj Nysa Łużycka, determinita jam en Potsdamo, konfirmo fare de Germana Federacia Respubliko, rezigno pri kiuj ajn teritoriaj pretendoj flanke de GFR — nun kaj en la estonto. En tio ĉi konsistas ĉefe la signifo de tiu ĉi traktato.

La normaligo de la interŝtataj rilatoj PPR — GFR ne estas unufoja akto; estas kompreneble kaj per si mem evidente, ke tio ĉi estos procezo longdaŭra, ĉar ĝi postulas multajn transformiĝojn en la duflankaj rilatoj, ŝarĝitaj per la pasinteco, per la faŝista atako kontraŭ nian landon kaj elmurdo de pli ol 6 milionoj da civitanoj de nia lando (225 personoj je unu milo da civitanoj de nia lando).

Skribante ĉi tiun artikolon ne eblas — por la bono de la nuna komuna afero — ne menciigi en la momentoj tiel gravaj kaj riĉaj je espero — tiun plej malhelan kaj plej tragikan paĝon en la miljara historio de la polaj-germanaj interrilatoj.

La 1 de septembro en la 1939 jaro, Oświęcim, Treblinka, Majdanek kaj tiom da aliaj koncentrejoj hitleraj, la industrie farata amasa mortigado, la varsovia geto kaj tiom da aliaj getoj, la amasa surstrata mortpafado — ĉio ĉi apartenas ne nur al nia nacia konscio. Tio ĉi apartenas kaj devas aparteni al la germana nacia konscio.

La pola-germana traktato, konfirminte ĉi tiujn faktojn — eltiras la definitivajn konkludojn el la krimoj faritaj de la III Regno, pri kiuj la germanoj estas respondecaj. La ekkompreno de tiuj ĉi konsekvencoj ne estis transe de Elbo afero facila kaj verŝajne ankoraŭ dum certa tempo ne estos afero facila.

Ja tion ĉi gravgrade kaŭzis la dudekjara regado de la kristandemokrataro, regado revenĝema, ne agnoskanta la realaĵojn en Eŭropo, ekestinajn rezulte de la II mondmilito.

Tial do nenio miriga, ke la samaj kristandemokratistoj, jam ne parolante pri la novfaŝistaj — provas hodiaŭ per ĉiaj eblaj rimedoj kontraŭstari tiun ĉi traktaton, kiel ankaŭ la pli frue subskribitan traktaton Sovetunio — Germana Federacia Respubliko pri neaplikado de la forto.

La traktato pri la fundamentoj por normaligo, senprecedenca traktato por ambaŭ niaj nacioj — konformas do al la plej vivgravaj interesoj de ambaŭ nacioj — ĝi for transpasas la duflankajn rilatojn. Tio ĉi estas grava, pozitiva faktoro malstreĉa por la eŭropaj rilatoj, ĉar ĝi agnoskas kaj likvidas unu

Vickanceliero Walter Scheel en la koncentrejo de ekstermo en Auschwitz



el la tiel gravaj fontoj de eblaj, virtualaj tensioj, faras vojon por sistemo de kolektiva, ĝenerala sekurigo de la paco sur nia kontinento, por honesta, ĝusta kunlaboro Oriento-Okcidento, por Eŭropo sen militaraj blokoj kaj sen la vetarmigado, tiel tre ŝarĝanta la buĝetojn de la unuopaj ŝtatoj.

Tial do prave la eŭropa kaj la monda publika opinio vidas en tiu ĉi traktato sukceson de la konsekventa pacpolitiko de PPR kaj manifestigon de la politika realismo flanke de la registaro de GFR, gvidata de antifaŝisto Willy Brandt.

La traktaton subtenis ne nur eminentaj ŝtatestoj, politikistoj aŭ kulturhomoj de ambaŭ duongloboj. Subtenon por ĝi esprimis la registaroj de multaj ŝtatoj, inkluzive kompreneble la registarojn de la granda kontraŭhitlera koalicio el la tempo de la II mondmilito. Tiun ĉi traktaton subtenis eĉ la registaro de Usono (unu el la ĉefaj partoprenintoj de la menciita antifaŝisma koalicio), kiu ne de hodiaŭ tiel malinklina estas al malstreĉiĝo, inkluzive ankaŭ, kaj eble unuavice: al malstreĉiĝo sur la eŭropa kontinento.

Sed la mondo ja ne havas alian alternativon, ol intertraktadon, ol politikan kaj diplomatian solvodon de ĉiaj problemoj, ol malstreĉiĝon.

Tiele konturiĝas la estonto kaj tia — ni esperu — ĝi estos.

La kroma antaŭpremis por tiu ĉi fido estas la jam komencitaj interparoloj GDR — GFR kaj la anoncigitaj, estontaj interparoloj Ĉeĥoslovakio — Germana Federacia Respubliko kaj eventuale interparoloj de GFR kun aliaj socialismaj landoj.

La traktato pri la fundamentoj por normaligo de la rilatoj PPR — GFR estas ankoraŭ ratifota de la parlamentoj de ambaŭ landoj. Ni estas konvinkitaj, kaj tiun ĉi konvinkon klare esprimas ankaŭ la okcidentgermana flanko, ke Bundestag ratifos tiun ĉi traktaton. Pruvajo pri tio ĉi estas la subteno, kiun al tiu ĉi traktato donas la okcidentgermana socio, en kiu okazis gravaj kaj principaj transformiĝoj. Rezulte de ĝuste tiuj ĉi transformiĝoj estis ja ebla la atingo de la koalicio SPD — FDP al la povo kaj la gvidado de la nova orienta politiko fare de la nova registara ekipo en Bonn, politiko ebliginta la subskribon de la traktato Sovetunio — Germana Federacia Respubliko kaj de la preparolita traktato Pola Popola Respubliko — Germana Federacia Respubliko.

Tiu ĉi politiko akiras en la mondo multan rekonon por la ekipo de Brandt — Scheel.

Mi opinias, ke en tiu ĉi artikolo oni devas esprimi la konvinkon, ke la traktato PPR — GFR fariĝos unu el la turnpunktoj en la historio de la postmilita Eŭropo, kondukantaj al Eŭropo de kunlaboro kaj ĝenerala paco kaj sekureco de la nacioj sur tiu ĉi kontinento.

La pola-germana traktato apartenas do al la paclibroj kaj estas klara venko super la malvarmmilitaj fortoj en Eŭropo, ja ankoraŭ firmaj, en tiu ĉi tiel neŭralgia punkto de Eŭropo, en kiu ja ekestis en tiu ĉi jarcento kaj disvastiĝis per siaj kruelaj taĉmentoj la du mondmilitoj plej teruregaj en la historio de la homaro.

Kun espero kaj aktiva fido ni, poloj kaj vi, germanoj — devus do rigardi al la proksima kaj malpli proksima estonto.

EL LA KOLEKTO DE JERZY KOWALSKI

„La rapida soci-ekonomia evoluo de la nacioj — konstatis la prezidanto de la Prezidumo de la Urba Nacia Konsilantaro en Krakovo, kaj samtempe prezidanto de la Krakova Komitato de la Pac-Defendantoj, Jerzy PEKALA — postulas konstantajn kontaktojn kaj intiman kunlaboron. Konservado de la paco en la mondo en granda grado dependas de proksimiĝo, reciproka pli bona konatiĝo de la homoj de la diversaj rasoj kaj nacioj. Esperanto povas ludi tiurilate esencan rolon, ebligante ĝuste tian interproksimiĝon kaj pli plenan profitadon el la trezorejo de la tuthomara kulturo. Mi do plene subtenas la ideon enkonduki Esperanton en la lernejojn”.

„Szybki rozwój społeczno-gospodarczy narodów — stwierdza przewodniczący Prez. MRN w Krakowie, a zarazem przewodniczący Krakowskiego Komitetu Obrońców Pokoju — Jerzy Pękala — wymaga stałych kontaktów i ścisłej współpracy. Zachowanie pokoju na świecie zależy w dużej mierze od zbliżenia, wzajemnego lepszego poznania się ludzi różnych ras i narodów. Esperanto może tu odegrać istotną rolę, umożliwiając właśnie takie zbliżenie oraz pełniejsze korzystanie ze skarbnicy ogólnoludzkiej kultury. W pełni zatem popieram ideę wprowadzenia do szkół esperanto”.

*

„Mi opinias, ke la hodiaŭa altagrade organizita mondo nepre necese bezonas ĝustan internacian lingvon. Mi ne opinias la anglan lingvon konforma al la kondiĉoj starigataj de la homaro, travivanta la konscian evoluon de individuecismo al monoorganismo. Mi opinias, ke enkonduko de Esperanto en la lernejojn en la tuta mondo estas nepropra de la momento”.

Prof. d-ro Jerzy Janik

„Uważam, że dzisiejszy wysoko zorganizowany świat koniecznie potrzebuje właściwego języka międzynarodowego. Nie uważam języka angielskiego za spełniający warunki wymagane przez ludzkość, przeżywającą świadomą ewolucję od indywidualizacji do monoorganizmu. Sądzę, że wprowadzenie esperanta do szkół na całym świecie jest koniecznością chwili”.

Prof. dr Jerzy Janik

*

„Mi subtenas la strebojn de la aŭdaca esperantista movado, celantaj praktikan enkondukon de tiu ĉi lingvo pere de UNO por la instruado en ĉiuj mezlernejoj de la tuta mondo, kiel ankaŭ — konsiderante la eminentajn valorojn de tiu ĉi lingvo en la batalo por la paco — mi opinias pravaj la klopodojn pri aljuĝo de la Paca Nobel-Premio al la Universala Esperanto-Asocio”.

Prof. d-ro Wincenty Danek

„Popieram dążenia śmiałego ruchu esperanckiego, mającego na celu wprowadzenie praktyczne tego języka poprzez ONZ do nauczania we wszystkich szkołach średnich całego świata, jak również mając na względzie wybitne walory tego języka w walce o pokój uważam za słuszne starania o przyznanie Światowemu Związkowi Esperantystów pokojowej Nagrody Nobla.

Prof. dr Wincenty Danek

ESPERANTA ĤEMIA NOMENKLATURO*

La studentoj de ĥemio en la superaj lernejoj konatiĝas kun la ĝenerala ĥemia nomenklaturado. Sed jam dum ili estas specialistiĝantaj aŭ dum la laboro ili devas uzi la nomenklaturon de iu ĥemia branĉo. La nuntempa rapida disvolviĝo de la monda ĥemio iras ĉiam pli profunden en diversaj ĥemiaj branĉoj. Jam ne sufiĉas la ĝenerala ĥemia nomenklaturado kaj evidente ekzistas la bezono de fakaj branĉaj terminoj. La bezono de vortaroj de diversaj branĉoj de ĥemio kaj fakoj ligitaj kun ĥemio, en kiuj estas uzataj ĥemiaj esprimoj. La vasteco de la ĥemia scienco kaŭzas, ke oni povas diri, ke ĉiu ĥemia branĉo estas kvazaŭ memstara scienco. Ekz., kion komunan havas la ĥemia branĉo de feraj aĵoj, apoganta sin sur la ĥemia elemento de Fe(fero), kun la ĥemia branĉo de la artefaritaj materialoj (plasto) aŭ farmaciaĵoj? Nur tion, ke ambaŭ apartenas al ĥemio. Mi donis la ekzemplon substrekante la diferencan inter la neorganika kaj organika ĥemioj. Sed ankaŭ en la organika ĥemio estas grandegaj diferencoj. Grandega estas la diferenco inter la ĥemia branĉo de la artefaritaj materialoj kaj farmaciaĵoj, odoriloj, terpenoj, ktp.

Memorante, ke la ĥemia nomenklaturado estas la plej malfacila inter ĉiuj aliaj fakoj — pro sia vasteco — ne estas mirige, ke ĝi falis en multajn konfuzojn sen elirebloj. Precipe en la organikaj branĉoj la ĥemia faka nomenklaturado estas tre vasta. Por la uzantoj de ĥemio en la vivo kaj laboro kreis jam multaj branĉaj terminaroj, ekz. terminaro por la sukera teĥnologio, papera teĥnologio, fermentaĵoj, ktp. La ĥemia nomenklaturado disvolviĝas en la tuta mondo kaj ŝanĝiĝas dum internaciaj konferencoj normigantaj la ĥemiajn nomojn. Do, la ĥemia nomenklaturado ŝanĝiĝas. Ekz. oni povas pritaksi la fakon, ke la angla ĥemia nomenklaturado multe ŝanĝiĝis en la 1952 jaro.

Lastatempe, en la 1964 jaro Internacia Komisiono ŝanĝis kaj normigis la nomojn de la fermentaĵoj. Post tia normigo kaj fikso de la nomoj, kiuj estas prilaboritaj kaj fiksitaj en iu lingvo nacia, estas la neceso adapti la ĥemiajn nomojn al aliaj naciaj lingvoj laŭ ilia spirito, evitante lingvajn konfuzojn. Ankaŭ la esperanta ĥemia nomenklaturado devas esti adaptita kaj per tio ĉi diferencas iagrade disde la diversaj naciaj nomenklaturadoj. Oni devas krom tio ĉi memori, ke ju malpli tia nomenklaturado diferencas disde la nomenklaturadoj de aliaj lingvoj — des pli

bone. Sed eviti ĉi tion absolute ne estas eble. La nomenklaturado devas rigardi la karakteron de la lingvo, por kiu ĝi estas adaptata.

La ĉefa elirpunkto por la ĥemia nomenklaturado en ĉiuj lingvoj estas prenado kaj fikso de la nomoj de ĥemiaj elementoj, ĉar la nomoj de la ĥemiaj kombinaĵoj entenas ĉefe la radikojn de la elementoj. En Esperanto la nomoj de la ĥemiaj elementoj devenas de iliaj latinaj nomoj. Simile en la germana kaj angla lingvoj (kaj ankaŭ en aliaj) la ĥemiaj elementoj devenas de la latinaj nomoj, tial la esperanta nomenklaturado similas al la germana-angla nomenklaturado. Nur estas demando de la adaptado de ili al Esperanto, por maksimume eviti konfuzon kun la ĝenerala lingvo.

La esperanta faka nomenklaturado disvolviĝas. Precipe la lasta jardeko estis ĉi-rilate fruktodona kaj alportis prilaboron kaj eldonon de vortaroj pri unuopaj fakoj en vico da landoj. Aperis ankaŭ literaturaj verkoj interesantaj nur fakulojn. Kreis do vortaroj: elektroteĥnika, mekanika, maŝina, fervoja, ŝosea, geologia, medicina, militara, gastronomia, ktp. Multaj aliaj estas prilaborataj.

Ankaŭ la ĥemia fako ne restis flanke. Aperintajn jam en la antaŭaj jardekoj 5 malgrandajn ĥemiajn vortarojn kune kun la sesa, eldonita en la 1956 jaro en Londono, malgranda ĥemia vortaro angla-esperanta, oni devas trakti kiel provon doni al la vasta publiko kaj artikolskribantoj en tiu ĉi lingvo, la ĥemian nomenklaturon, samkiel konatigi ilin kun la aplikado de la ĥemiaj nomoj en esperanto. Kronologie aperis jenaj vortaroj:

1. Jaro 1969 — P. Benthelot
2. " — ISAE
3. " — T. Rondeto
4. " — T. Madea
5. " — K. Dellian
6. " 1956 — R. Duncan
7. " — J. Pióro

Provo de Kemia Normigado, Parizo
 Esperanta Nomenklaturado de Kemio,
 Parizo
 Leksikono de Kemio kaj Farmacio,
 Tokio
 Kemia Terminaro, Munkeno
 English-Esperanto Diction, Londono
 Kemiaj Afiksoj Internaciaj,
 Varsovio

do 7 malgrandaj vortaroj, proksimume unu vortaro dum 10 jaroj.

De post la 1965 jaro aperas regule serioza scienca faka periodaĵo pri ĥemio kaj ĥemia industrio en Espe-

ranto sub la titolo „Kemio Internacia”, eldonata jarkvarone en Urugvajo. La ĥemiistoj skribantaj artikolojn por „Kemio Internacia” kaj anoncantaj tie la rezultojn de siaj sciencaj esploroj devenas el diversaj landoj. Fariĝis do urĝa bezono unuecigi la ĥemian nomenklaturon, kaj ankaŭ prilabori unuecan fundamentan, logikan en la tuto de la ĥemio, nomenklaturan elirbazon.

Antaŭvidante tiun ĉi bezonon kaj vidante laŭ la ekzemploj de la ekzistantaj prilaboroj kaj publikaĵoj (PV) la mankon de elirbazo por la kompilado de vortaroj kaj skribado de ĥemiaj prilaboroj la aŭtoro de tiu ĉi artikolo komencis jam en 1957 jaro prilaboron de la unuaj fundamentoj de la nomenklaturado per la donado de esperanta signifo al la ĥemiaj afiksoj uzataj dum la kreado de la ĥemiaj nomoj. La plua disvolvado de la esperanta ĥemio devas iri en la direkto de maksimume prilaboritaj reguloj regantaj la ĥemian nomenklaturon. Kiel la diskutita materialo estis disdonitaj inter kelkdeko da fakuloj du prilaboritaj en la jaroj 1966 kaj 1968 ĥemiaj normoj por la ĥemia nomenklaturado kun simboloj EoN-K-00001 kaj EoN-K-00002 (esperantaj normoj, kemio, numero 1 kaj 2) sub la titoloj: „Ĝeneralaj nomoj de la neorganikaj kaj organikaj kombinaĵoj” kaj „Fermentaĵo”. Tiu ĉi lasta jam ne estas ĝenerala, sed branĉa normo.

Speciale grava por la multflankaj esprimpovoj de la ĥemiaj kombinaĵoj mi opinias la bezonon de aplikado de la finaĵo „io” al ĉiuj ĥemiaj elementoj. Tio ĉi ebligas ekziston de 2 specoj de la ĥemiaj nomoj. La nomoj devenantaj de la tiel nomataj „kombinaĵaj formoj de la ĥemiaj elementoj” (per forĵeto de la finaĵo „io” el la ĥemia elemento). Vidu: „Kemiaj Afiksoj Internaciaj”. Nur per aplikado de la finaĵo „io” por ĉiu ĥemia elemento oni povas ricevi tiel riĉajn esprimpovojn de la ĥemiaj kombinaĵoj en Esperanto.

Kiam la afero de la esperanta ĥemia nomenklaturado estos pli matura, iu internacia esperanta komisiono elektos la plej ĝustajn solvojn. Nuntempe validas nur la proponoj kaj eltrovsolvoj. Do ni ne hezitu proponi kaj doni plenajn, komplekse prilaboritajn solvojn por la esperanta ĥemia nomenklaturado. Tio ĉi estas nur ŝtupoj en la evoluo. Sed estas absolute necese prilabori komplekse la temon kaj ne uzi ĥemion en Esperanto laŭ ŝajno aŭ laŭ pura traduko el la nacia lingvo, sen konatigi kun la jam ekzistantaj esperantaj prilaboroj.

*) La artikolo estis skribita en la j. 1970.

El la paĝoj de la pola historio

La Konstitucio de la 3 de Majo 1791 j., kies datrevenon de la proklamo ni solenas en la nuna jaro, proklamita de la Kvarjara Sejmo kaj formulita en XI artikoloj, estis la unua tiaspeca en Eŭropo.

Kiam la eksteraj cirkonstancoj komencis favori (Rusujo kaj Aŭstrujo estis okupitaj pri la milito kontraŭ Turkujon, kaj la prusa reĝo estis en streĉaj rilatoj kun Peterburgo), — oni elprofitis ĉi tion por okazigo de reformo de la sociordo. La neforpasebla valoro de la Konstitucio de la 3 de Majo konsistas en la venko de la patriotaj kaj progresemaj sociaj fortoj, ĝia ĝenerala direkto estas la ideo de renovigo de la ŝtato.

Ĉi-sube ni transpresas porokazan artikolon el la ĵurnalo „Trybuna Ludu” („Tribuno de la Popolo”), presorgano de la Centra Komitato de la Pola Unuiĝinta Laborista Partio, n-ro 123 el la 3 de majo 1971.

La ideoj de la Konstitucio de la 3 de Majo

[Z. Siedlecki]

La leĝajn aktojn, precipe la fundamentajn leĝojn, estantaj fonto de la leĝoj, oni ne povas pritrakti „ĝenerale”, aparte de la ekonomiaj, sociaj kaj politikaj realaĵoj, inter kiuj ili efektiviĝas. Tio ĉi ja estus sterila/metafiziko. Kion ekzemple signifas la belaj vortoj „libereco, egaleco, frateco”, estantaj la bazoŝtonoj de la burĝaro akiranta la povon? Libereco ja estis ankaŭ libero de la ekspluatado de homo fare de homo, egaleco signifis pure formalan egaligon antaŭ la leĝaro, frateco signifis alvokon al klasa solidariismo, al avantaĝa por la proprietuloj konkordo inter la ekspluatantoj kaj ekspluatatoj.

Oni do povas diri nemulte, antaŭ ol la leĝaro ekzameniĝis en la praktiko, en la ekonomia, socia kaj politika praktiko. Tiu ĉi praktiko estas ĝia mezurdo — kaj la rezulto de la provo povas ege surprizi tiun, kiu pritaksas la vortojn ne transpasante la atingecon de la semantiko. Valoras memori, ke la leĝa ordo, apoganta sin sur la fundamentoj de „libereco, egaleco, frateco”, permesis al la versajlanoj fari la legalan buĉadon de la komunanoj...

Rigardante al la proklamita antaŭ 180 jaroj Konstitucio de la Tria de Majo — dank' al laboro de historiistoj — ni klare vidas ĝian genezon, ni vidas la sociajn fortojn, starintaj malantaŭ ĝi kaj kontraŭ ĝin. Sed ni ne disponas materialon plej necesan por pritrakso, kiu estas veriĉo de la Konstitucio en la funkciado. Ĉar antaŭ ol la Konstitucio komencis funkcii — estis neniigita la objekto de ĝia agado: Pollando perdis la memstaran ŝtatan ekzistadon, kaj la lando estis dividita inter tri aneksajn ŝtatpotencojn. Tio ĉi estas en la universala historio, konsiderante ĝian skalon, kazo sen precedenco kaj sen ripetiĝo, estas malfacile trovi kie ajn analogian situacion: konstitucio sen la kontinuo, sen konsekvencoj.

Ne havus grandan sencon ŝpini ne tiom historiajn, kiom historiozofiajn kaj kondicionale gvidatajn pripensojn super ĝiaj eventualaj sekvoj. Nemulte ni ankaŭ povas profiti la aprezojn de la tiutempuloj, oscilantaj inter la prezentataj de carismo akuzoj pri jakobanismo, kaj jetataj en la flugfolioj de la revolucia Parizo akuzoj pri konservativismo; meze de tiuj ĉi ekstremaj ekstroviĝis koncepto esprimita en la brita parlamento per la buŝo de E. Burke: „La pola ĥaoso estas venigita al ordo... Ekde la reĝo eĉ ĝis la brava metiisto, ĉiu en sia situacio konfirmita, ĉiu afero en sia kanelo daŭrigita, kaj en tiu ĉi kanelo ĉiu afero plibonigata”. Tio ĉi respegulas nur la kompromisan karakteron de la Konstitucio, naskita en tre kompleksa interna situacio de Pollando en la fino de la antaŭlasta kaj lasta jardekoj de la dekoka jarcento.

La Konstitucio sen la kontinuo, sen konsekvencoj...

Gi estas konstato vera nur en la formala senco. Ĉar kvankam malaperis la ŝtato, kies leĝan kaj politikan

karakteron ĝi estis difinonta — ne ĉesis ekzisti la nacio. Kaj jen denove ni havas rilaton kun kazo senprecedenca en la historio: la Konstitucio, formale trastrekita per la lasta dispartigo de la pola ŝtato, fariĝis faktoro forte kaj firme influanta la nacion senigitan je la ŝtata ekzistado, ĝian subteran politikan vivon, la nacian kulturon, la psikon de la poloj. Vidate de la nacio, kiu dum cent kvindek jaroj luktis por sendependeco, Pollando, kiu malaperis de sur la politika mapo de Eŭropo, ne estis Pollando de „liberum veto”, ne estis Pollando saksa, Targowice-a, kvankam ja ĝuste tiuj ĉi elementoj decidis pri ĝia profilo. Ĝi estis Pollando de la Konstitucio de la Tria de Majo, Pollando de la Kościuszko-a Insurekcio. Turnante la okulojn al la pasinteco, la nacio vidis ne la malhonoron de la falo, sed la „majan aŭroron” de la renaskiĝonta patrujo.

Ĉi tiu specifa rigardkoncentro sur la „maja aŭroro”, kvankam ne malhavanta sentimental idealecigadon, fekunde influadis la nacian penson, helpis la formigadon de la politikaj nocioj kaj kategorioj, derivigantaj el la Konstitucio de la 3 de Majo, kaj havantaj vivon longan, ĉar foje en modifita formo atingantan al nia tempo.

El la spirito de tiu ĉi Konstitucio rezultis la rifuzo de la koncepto, ne kontestita dum kelkaj antaŭaj jarcentoj, ke la nacio kaj la nobelaro estas la samo. La Konstitucio rimarkis la ekziston de la burĝaro kaj kamparanoj; ĝi traktis ilin duonpatrine — sed agnoskis ilian ĉeeston. Tio ĉi fakte estas nemulte, sed oni devas memori, ke la agnosko de la ekzisto estas enkonduko al akiro de rajtoj. La ekkrio „Vivat la reĝo, vivat la nacio, vivat ĉiuj tavoloj” estis rompanta la nobelan monopolon politikan, anoncanta la kreskantan partoprenon de la sociaj tavoloj en la publika vivo, al kiuj dum longaj jarcentoj laŭprograme oni rifuzadis tiun ĉi partoprenon. Ĝi fakte eksonis cent kvindek jarojn post la angla revolucio kaj samtempe kun la franca revolucio, sed oni devas konsideri ankaŭ, ke oni levis ĝin en la lando, kie la burĝaro ne havis — kiel en Okcidento — kalkulindan ekonomian forton, kaj la kamparanoj troviĝis sur la fundo de la servuto.

De tiu tempo en la pola politika vivo de la periodo de la mallibereco oni ne plu negis la partoprenon de la malpli altaj tavoloj; eĉ la ekstreme reaciaj elementoj devis ĉi tion konsideri kaj serĉi en siaj programoj eŭfemismojn formale kontentigantaj ĉi tion. Pli poste cetere la konservativaj politikistoj provis akiri per tio ĉi kapitalon: el tio ĉi ili derivadis la devizon de klasa solidariismo, kiu estis faciliganta al la burĝaro la regadon. Tiel ja en la batalo kontraŭ la maldekstro interpretis la Konstitucion de la 3 de Majo la t.n. sanacio en la intermitita jardudeko.

La „maja aŭroro” radiis per patriotismo. Ne per tiu romia laŭ la sono — *salus rei publicae suprema*

lex — kaj venigita al frazo trivata dum la elektoj kaj seĝmetoj, sed per patriotismo sonanta jam pole — am' sankta al patrujo kara — kaj komprenata kiel supereco de la fundamentaj bezonoj de la patrujo rilate la tavolan kaj privatan intereson. Tio ĉi fariĝis konvinko agnoskita, kio fakte ne signifas obeata, ĉar neunufoje oni ĉirkaŭiradis ĝin, sed kreanta la premon de la publika opinio kaj de la propra konscienco. Komprenable la nobelaro pro sia klasa karaktero ne povis esti portanto de patriotismo. Ĝi disvastiĝadis en Pollando des pli abunde, ju pli la politika vivo estis iranta profunden en la plebon kaj en la popolon, ĝis kiam ĝi trovis esprimiĝon en la popola, proletara patriotismo. Vidante ĉi tiun ĝian historian evoluon, oni devas memori, ke en ĝia genezo la Konstitucio de la Tria de Majo ludis tre gravan rolon.

Kaj fine el la spirito de tiu ĉi Konstitucio deriviĝas la konvinko, kiu en la historio de Pollando trovis speciale fortan esprimiĝon, ke konservo de la memstara ŝtata ekzistado nedisŝireble ligiĝas kun la progreso. Kun la progreso komprenata kiel „plibonigo de la Respubliko”, plibonigo esprimiĝanta en lerta, leĝeca administracio, en la adaptado de la leĝoj kaj preskriboj al la postuloj ŝanĝiĝantaj en ĉiu epoko. Kaj ankaŭ — kio laŭ la fluo de la tempo fariĝadis pli kaj pli evidenta — kun la socia progreso. La laŭvicaj fazoj de la evoluo de la nacia penso, esprimiĝantaj en la laŭvicaj insureciaj kaj revoluciaj leviĝoj, firmiĝadis kaj disvolviĝadis ĉi tiun konvinkon, ĝis kristaliĝis ĝi en la principo de unueco de la batalo por nacia kaj socia liberiĝo de Pollando, lumgvidinta la polan laboristan movadon eĉ ĝis la tempo de la batalo kontraŭ hitlerismon kaj principo difinanta la nunan politikan realon de nia patrujo, kiu ekzisti sendepende povas nur kiel socialisma ŝtato, ŝtato de la socia progreso.

Ne eblas hodiaŭ ne menciigi pri ankoraŭ unu ideo emananta el la „maja aŭroro”, pri la ideo de la nacia edukado kiel kondiĉo por la evoluo de la nacio kaj lerta funkciado de la ŝtato. Kiel bone ni komprenas ĉi tiun ideon en la periodo de la scienc-teknika revolucio, kiam la nivelo de la eduko de la socio fariĝis la plej grava motorforto de la evoluo de la ekonomiko!

Tiel do la ne enkondukita en la vivon Konstitucio

de la ŝtato ne ekzistinta sur la mapo — ekzameniĝis en la funkciado, decide influante la vivon de la nacio en la mallibereco, la formiĝadon de la principoj kaj kategorioj de la moderna pola ŝtateco. Ĉi tiun influon ne eblas tro taksigi kaj tial, ne negante al la historiistoj, riproĉantaj al la Konstitucio de la 3 de Majo la kompromisecon kaj limigitecon, ni kondukas la rektan linion de la tradicio ekde ĝi eĉ ĝis nia tempo.

La jaro 1971, en kiu pasas ĝia 180 datreveno, alportas novan, belan pruvon pri la omaĝo kaj pietismo rilate ĝian tradicion: la decidon rekonstrui la Varsovian Kastelon.

La nacia memoro ne ligas kun la Kastelo — kontraŭe al Vavelo — la figuron de iu ajn el la grandaj regintoj. La Vazoj ja estis atestantoj de la kliniĝado de la potenco de la Respubliko, la Saksoj — la atestantoj de ĝia falo. Sobieski, kies figuro lumas per la brilo de la venko apudviena, plaĉigis al si Wilanów, kiun ni jam bele restaŭris. Sed ja ĝuste ĉi tie, en la malnovkvartala Varsovio kaj en la muregoj de la Kastelo naskiĝis pli abunde ol kie ajn kaj influis kun pli granda ol ie ajn forto la ideoj de plibonigo de la Respubliko, redono de ĝia brileco, fano de leĝeca, moderna, progresema ŝtato el ĝi. Ĉi tie, en la tumulto de la politikaj polemikoj de la Granda Sejmo, en la sonoranta per patriotismo kaj socia progreso Forĝejo Kollataj-a formiĝadis la principoj de la Konstitucio de la 3 de Majo. Ĉi tie, en la Kastelo oni proklamis la Konstitucion, de ĉi tie la „maja aŭroro” radiis al Pollando. Kaj tial, kvankam multaj estas la urgaj bezonoj, por kiuj valorus turni la fortojn kaj financajn rimedojn, sentata estas ĝenerale de la pola socio kaj de la samnacionoj eksterlande la bezono omaĝi tiun ĉi tradicion; tial la gvidantaro de nia partio decidis esprimi ĉi tiun senton per la decido rekonstrui la Kastelon.

Ŝajnas, ke la restaŭrontoj, starante antaŭ la nefacila decido rekrei la formon de la Kastelo, kiu dum la jarcentoj ŝanĝiĝadis — devus akcepti la principon rekonstrui ĝin tia, kia ĝi estis en la momento de sia plej granda brileco, kaj do en la tempo, kiam kun espero sin turnis al ĝi la okuloj de la tuta nacio, de ĉiuj ĝiaj tavoloj: en la periodo de la Kvarjara Sejmo.

Laŭ „Trybuna Ludu”

„Konstitucio de la 3 de Majo” — pentraĵo de Jan Matejko (eminenta pola pentristo, konata speciale kiel prezentinto de scenoj el la historio de Pollando) — Dumvoje al la katedralo de la Sankta Johano en Varsovio — En la profundo videbla la Reĝa Kastelo, pri kies rekonstruo ni skribis en la numero 2/71 de nia revuo





La blazono de la nunjara ĉefa manifestacio de la movado

KOMUNIKO

pri la konferenco de reprezentantoj de la Esperanto-organizaĵoj de la eŭropaj socialismaj landoj.

Laŭ la invito de la Germana Kulturligo (GDR) de la 25 ĝis la 29 marto 1971 okazis konsulta Konferenco de reprezentantoj de la Esperanto-organizaĵoj en la eŭropaj socialismaj landoj: Popola Respubliko Bulgarujo, Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko, Germana Demokratia Respubliko, Hungara Popola Respubliko, Pola Popola Respubliko kaj Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj.

En la Konferenco oni preparolis demandojn pri profundigo de la kunlaboro inter la Esperanto-organizaĵoj de la socialismaj landoj. Oni traktis ĉefe pli larĝan uzadon de la internacia lingvo Esperanto kiel taŭga instrumento ankaŭ por kontribuo al plia frata kunagado de la respektivaj popoloj en la politika, socia kaj kultura sferoj. La partoprenantoj diskutis la taskojn de la esperantistaro en la pacbatalo lige kun la kunlaborado de la neesperantistaj pacmovadoj, pri pli intensa uzo de la internacia lingvo por objektiva prezento de siaj landoj al la ekstera mondo favore al la intereso de la interkompreniĝado de ĉiuj popoloj senkonsidere al ilia socia ordo.

Reprezentantoj de la Hungara Esperanto-Asocio kaj Pola Esperanto-Asocio subskribis dum la Konferenco kontrakton pri kunlaboro inter la du Asocioj (vidu aliloke).

Flanke de PEA la Konferencon partoprenis: la prezidanto de la Ĉefa Estraro, mag. Lech Kosieniak, vicprezidanto, red. Jerzy Uśpieński kaj ĝenerala vicsekretario, mag. Jerzy Mażys.

LA PREZIDANTO DE UEA EN FINNLANDO

La prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio, Ivo Lapenna, profesoro pri la internacia juro en la Londona Universitato, estis invitita al Finnlando por la jubileo de la deka datreveno de la esperantista organizaĵo en Turku. Ĉi tion profitis tri universitatoj de tiu ĉi lando, en kiuj la eminenta londona juristo faris ciklon de lekcionoj pri la internacia juro.

ALTAJ DISTINGOJ POR AŬSTRAJ ESPERANTISTOJ

La prezidento de Aŭstrujo, d-ro Franz Jonas, kiu en aŭgusto de la pasinta jaro malfermis la 55 Universalan Kongreson de Esperanto

en Vieno kaj faris paroladon en Esperanto (li estas longjara esperantisto), aljuĝis altajn ŝtatajn distingojn — Orajn Merit-Medalojn — al kvar eminentaj aŭstraj esperantistoj, substrekante, ke la medaloj estas donitaj al ili pro meritoj sur la Esperanto-kampo.

KURSO DE ESPERANTO EL LA RADIO BRATISLAVO

Radio Bratislavo disaŭdigas lecionojn de Esperanto tri fojojn semajne, nome: lunde, vendrede kaj sabate. Lunde kaj vendrede ekde la horo 9.45 ĝis la 10, sabate ekde la horo 7.30 ĝis la 7.45.

La lunda leciono estas ĉiufoje nova leciono, la sekvaj — estas ripetaj lecionoj.

ESPERANTISTAJ ALTMONTARAJ GRIMPADOJ

Frank Ashley el Kalifornio konkrenis en la somero kaj aŭtuno de la 1969 jaro la plej altajn montpintojn en Usono. Ĉie sur la pintoj li fiksis esperantistajn flagetojn kun la verda stelo.

Frank Ashley estas unu el la plej konataj alpinistoj. Li planas konduki en la venonta jaro altmontarajn turistojn al la pinto de la monto Hood en la ŝtato Oregon. Tio ĉi estas okazonta en la periodo de la Universala Kongreso de Esperanto en Portland.

ESPERANTO EN SOVETUNIO

En la Palaco de Kulturo de Metalistoj en Ust-Kamenogorsk (Sovetunio) membroj de la esperantista klubo „Verda Horizonto” organizis malferman kunvenon por la loĝantaro, dum kiu antaŭ 1200 personoj partoprenintoj de esperantistaj kongresoj kaj tendaroj parolis pri la 55 Universala Kongreso de Esperanto en Vieno, pri la tutsoveta junulara tendaro esperantista apud Ufa (Baŝkira Aŭtonomia Soveta Socialisma Respubliko) kaj pri la dagestana esperantista labortendaro, organizita post la tertremo en tiu ĉi lando.

La kunveno estis intencita kiel propaganda kampanjo favore al Esperanto, kiu ĝuas en Sovetunio pli kaj pli grandan popularecon. Tion ĉi pravas interalie la kreskanta interesiĝo de la gazetaro, precipe de la junulara, pri Esperanto.

NOVA DOKUMENTO DE CED

ROTTERDAM. Jus aperis, en la serio „A” — la Internacia Lingvo Esperanto, Sekcio II — „la problemo de komuna lingvo”, nova CED-dokumentado sub la titolo: „LA PROBLEMO DE KOMUNIKADO EN LA MONDO”, verkita de d-ro G. F. Makkink, scienca ĉefoficisto en la Instituto pri Biologia kaj Kemia Esplorado de Agrikulturaj Vegetaĵoj en Wageningen kaj prezidanto de la Nederlanda Unuiĝo por Aplikado de Esperanto en la Scienco.

CED petas ĉiujn landajn asociojn apartenantajn al UEA traduki la dokumenton en la naciajn lingvojn kaj distribui ĝin precipe en la medio de sciencistoj.

K O N T R A K T O

PRI RECIPROKA HELPO KAJ KUNAGADO

HUNGARA ESPERANTISTA ASOCIO (Budapest, VIII. Kenyèrmezö-u. 6.) mallonge HEA kaj POLA ESPERANTO-ASOCIO (Warszawa I, ul. Jasna 6) mallonge PEA, kiel la sole rajtigitaj reprezentantoj de la Esperanto-movado en siaj landoj, kiuj staras sur la sama ideologia bazo,

opiniante, ke Esperanto povas ludi seriozan rolon en la konstruado de la socialisma socio kaj ĝi povas sukcese akceli la pacan kunvivadon inter la diverslingvaj popoloj,

konvikiĝinte, ke la reciproka helpo kaj kunlaboro eĉ pli efike firmigas la tradicion amikecon kaj la fratajn sentojn inter la du historie samsortaj nacioj,

konsidere al tio, ke ekzistas reala eblo komune agadi en certaj rilatoj per la rimedoj, kiuj staras jam nun je la dispono de ambaŭ flankoj kaj eblas tiamaniere pli prosperigi la Esperanto-movadon en ambaŭ landoj,

venis al interkonsento pri kunlaboro kaj por ties realigo la flankoj ligas jenan kontrakton.

I. La flankoj devontigas sin doni reciprokan helpon ĉe la prezentado de la lando antaŭ la publiko de la alia flanko.

Tiucele PEA aranĝos Hungaran Tagon en Pollando, kaj HEA aranĝos Polan Tagon en Hungarlando, ĉiujare en la plej konvenaj tempo kaj loko. Se la kondiĉoj permesos, la programo povas esti prezentata krom en la ĉefurbo — ankaŭ en aliaj lokoj de la gastiganta lando.

La programo konsistu:

a) el koniga prelego kaj aldone el kultura, nacikarakterata parto

b) el ekspozicio de esperantaĵoj (libroj, gazetoj, fotoj ktp.) aranĝota en kultura instituto de la koncerna flanko en la gastiganta lando. Do, PEA ekspozicias en la Pola Kultura Centro en Budapeŝto, kaj HEA en la Hungara Kultura Instituto en Varsovio

c) el grupkunvenoj en la akcepta lando kun programo aranĝota de la gastoj.

II. La flankoj aranĝas porokazajn prelegojn unu ĉe la alia — pri difinita temo, ekzemple pri rememorindaj jubileoj de siaj monde konataj naciaj granduloj.

III. La flankoj aperigas reciproke en la asociaj organoj artikolojn aŭ informojn konigantaj gravajn okazaĵojn en la vivo de ambaŭ landoj kaj organizaĵoj.

IV. La flankoj reciproke sendas oficialan delegiton por gravaj asociaj aŭ aliaj solenaj kunvenoj.

V. La flankoj reciproke interŝanĝas siajn laborplanojn kaj informas unu la alian pri siaj plej gravaj agoj.

VI. La regionaj kaj lokaj filioj kaj grupoj de la du asocioj partoprenas la realigadon de la kontrakto per planado kaj plenumado de kunlaboraj iniciatoj kun la samrangaj organizaĵoj de ambaŭ asocioj. Ili estu interalie: organizo de specialaj vesperoj kaj ekspozicioj okaze de la naciaj festoj, stimulado al reciproka korespondado, starigo de kunlaboro inter E-grupoj de la ĝemeliĝintaj aŭ kunlaborantaj urboj de ambaŭ landoj, interŝanĝo de grupvizitoj ktp.

La flankoj konsideras jenan kontrakton, kiel la unuan paŝon al kunordigita kunlaboro kaj firme kredas, ke per plenumo de la surprinitaj taskoj ili agas favore al la intereso de ambaŭ Asocioj.

La kontrakto ekvalidas post ratifo kaj laŭnorma subskribo fare de ambaŭ flankoj.

Berlino, la 29 de marto 1971.

nome de
la Prezidantaro de HEA

BERCELI BÉLA
MOLNAR JENŐ

nome de
la Ĉefa Estraro de PEA

LECH KOSIENIAK
JERZY USPIENSKI
JERZY MAZYS

BELGUJO. Inter la 5 kaj 7 de aprilo okazis en Antverpeno la I Kunordiga Konferenco por enkonduko de Esperanto en la lernejojn — organizita de la sekcioj de la Internacia Ligo de la Esperanto-Instruistoj de Belgujo, Francujo, Germana Federacia Respubliko kaj Nederlando. Interalie oni diskutis raportojn pri la temoj: „Kiom da instruistoj estas pretaj por instrui Esperanton?“, „La opinio de la instruistaj sindkatoj rilate al Esperanto“, „Laŭ kiu instruprogramo Esperanto estas instruata?“, „Kiujn lernolibrojn oni uzas?“

HISPANUJO. Centro de Esperanto Sabadell (Gral. Mola 99, Sabadell, Hispanujo) kunlabore kun la loka ŝparkaso, aranĝos en oktobro 1971 internacian konkurson pri infandeseĝnaĵoj okaze de la Universala Tago de la Ŝparado. Esperantistaj infanoj de la tuta mondo (4 ĝis 12-jaraĵoj) sendu ĝis la 30 de aŭgusto desegnaĵojn pri laŭvola temo, sur blanka papero 21 × 29 cm, al la supra adreso. Ĉiu aĝogrupo (4—6, 7—9, 10—12) ricevos tri kvalitajn premiojn kaj diversajn premiojn.

ITALUJO. Laŭ informoj de d-ro Giovanni Marchiori, lastatempe tre viglan agadon disvolvas la Verona Esperanto-Societo, kies membraro kreskis ĝis 132 personoj. Pliaj 120 personoj, ĉefe gejunuloj, partoprenas nun kursojn de la internacia lingvo. La kursojn malfermis la vicurbestro de Verona, prof. Ameglio Rizzini, kiu en sia parolado akcentis la valoron de Esperanto por la internacia kompreniĝo kaj ekkonado de alilandaj kulturoj. Estas aldoninde, ke la agadon de la Verona Esperanto-Societo subvencii lastatempe du lokaj bankoj per 75 mil italaj liroj, kaj provinca instanco promesis subvencii la agadon per 50 mil liroj.

MONGOLUJO. La 15 de decembro 1970 fondiĝis Mongola Esperanto-Uniĝo okaze de la 111 datreveno de la naskiĝo de d-ro L. L. Zamenhof. La celo de la uniĝo estas propagandi kaj disvastigi la internacian lingvon en Mongolujo. Nun en Ulan-Batoro oni aranĝas esperantan bibliotekon, por kiu oni serĉas esperantajn librojn, gazetojn ktp. Bonvolu helpi al niaj mongolaj amikoj kaj sendi esperantaĵojn laŭ la adreso: Mongola Esperanto-Uniĝo, pk 733, Ulan-Bator, S-ro Ĉoj Luvsanĝav, Mongolujo.

RIGA. Paĝo de la veteranoj. Aŭtoro vespero de la konata poetino-esperantistino Ludmila Jevsjejeva okazis en Riga la 31 de marto.

NÜRNBERG (GFR). Dank' al intensa informado ĉe la bibliotekoj kaj universitatoj, pli kaj pli da sciencaj bibliotekoj mendas Esperanto-librojn. Ĝus mendis Lingvo-Scienca Seminario de la Universitato gramatikajn librojn je la valoro de pli ol 200 GM. Krom la bazaj verkoj („Fundamento de Esperanto“, „Fundamenta krestomatio“, „Lingvaj respondoj“, „Originala verkaro“, lernolibroj kaj vortaroj, ankaŭ PIV), estis menditaj ankaŭ: „La mondpercepto de la modernaj natursciencoj“ kaj „Enkonduko en la librosanciencon de Esperanto“. (laŭ PILO-PRESS).

SERBIO. Serbia Esperantista Junulara Asocio decidis doni stipendion al 2—3 studentoj, por ke ili iru al Budapeŝto kun la celo finlerna la internacian lingvon kaj fariĝi diplomitaj mezlernejaj instruistoj de Esperanto.

SVEDUJO. Laŭ propono de la Sveda Esperanto-Federacio, la Stokholma Pac-Asocio aljuĝis sian pacpremion por la jaro 1971 al Andreo Cseh, sekretario de la Universala Ligo en Hago, pro lia unika apogagado por disvastigo de la Internacia Lingvo tra multnombraj eŭropaj landoj: ĉia. per siatempaj programetodaj kursoj en la Sveda Parlamento por parlamentanoj kaj gvidado de ŝtataj seminarioj Csehmetodaj por svedaj instruistoj. Ĉi tiun honoran premion oni disdonas nur ĉiun trian jaron al multmeritaj pioniroj de Esperanto.

EN POLLANDO

EN LA NOMO DE AMIKECO

Por la fino de la Semajno de Internacia Amikeco, okazis en Poznań interesa renkontiĝo en la sidejo de la Vojevodio Estraro de la Pola Esperanto-Asocio. Partoprenis ĝin reprezentantoj de sep societoj de amikeco, agantaj en la provinco Wielkopolska (Grandpolujo), i.a. de la Societo de la Pola-Hinda Amikeco, Societo por la Subtenado de la Scienca Kunlaboro kun Francujo, Societo de la Pola-Hungara Amikeco.

La partoprenantoj de la konferenco akcentis la novajn eblojn de agado kunlabore kun la esperantistoj. Oni determinis la formojn de reciprokaj kontaktoj en la nuna jaro, interŝanĝon de prelegantoj, filmoj ktp. Oni organizados komune vesperojn de la muziko de unuopaj nacioj.

TAGOJ DE LA HUNGARA KULTURO EN STUDENTA KLUBO

Studentoj el Bydgoszcz aktive aliĝis al la solenado de la Tagoj de la Hungara Kulturo en Bydgoszcz. Oni organizas plurajn interesajn aranĝojn. En la domo de la Fakultato pri la Surtera Konstruado de la Supera Inĝenieria Lernejo oni malfermis ekspozicion de fotoarto kaj revuoj. Okazos ankaŭ pola-hungara seminario en la lingvoj pola kaj Esperanto pri la temo: „La studentaj kaj junularaj problemoj en Hungarujo kaj Pollando”. En la programo de la tagoj oni antaŭvidas krome: seminarion, ankaŭ polan-esperantan, pri la fontoj de la pola-hungara amikeco; polan-hungaran vesperon kun partopreno de sekretario de la Instituto de la Hungara Kulturo kaj finalon de la konkurso: „Kion mi scias pri Hungarujo”. Okazos ankaŭ sonbenda prezento de ŝlagroj el ambaŭ landoj.

La aranĝojn organizas la Altlerneja Konsilantaro de la Unuiĝo de la Polaj Studentoj ĉe la Supera Inĝenieria Lernejo kaj loka Rondo de Esperantistoj.

SZCZECIN. Antaŭ nelonge finiĝis en Szczecin laŭvica kurso por komencantoj. Tre bonajn notojn ricevis kvin personoj. Ni sciigas pri tio ĉi pro la fakto, ke la plej bona kursano, inĝ. Adam Stanisławski, kiel la premion ricevis partoprenkarton en la Internacia Esperantista Feriado en Międzygórze — en la nuna jaro. Espereble la bonan ideon de la filia estraro en Szczecin sekvas aliaj polaj centroj de la movado.

En la vojevodio de BYDGOSZCZ —
PEA pli ol 600-membra!

En Bydgoszcz okazis la 7 de marto en la Vojevodio Kultur-Domo de Bydgoszcz vojevodio raporta-elekta konferenco de PEA. Partoprenis ĝin 80 delegitoj. Al la plej interesaj programeroj de la konferenco apartenis sendube la raporto de la prezidanto, mag. Andrzej Grzębowski, pri la agadperiodo en la urbo kaj vojevodio de Bydgoszcz en la 1969 kaj 1970 jaroj.

La raporto montris, ke oni disvolvis, mi aldonu — tre sukcese, jenajn agaddirektojn: informado, instruado, organizado de diversspecaj aranĝoj. Bonege disvolvita estas en tiu ĉi vojevodio la informado pri Esperanto kaj la konstanta ĉesto de la internacia lingvo kaj esperantista movado en la loka gazetaro, i.a. en la formo de konstantaj Esperanto-anguletoj. Ĉi-rilate speciale meritplenaj estas redaktoroj Kazimierz Małycha kaj Roman Rutkowski.

Sur la kampo de la Esperanto-instruado de la internacia lingvo en lernejoj:

Aktuale en 15 lernejoj diversstipaj kaj diversgradaj, inter kiuj en la Universitato je la nomo de Nikolajo Kopernik en Toruń — oni instruas la internacian lingvon.

Grandajn sukcesojn la esperantistoj el la vojevodio de Bydgoszcz atingis ankaŭ sur la kampo de organizado de enlandaj kaj internaciaj seminarioj, konferencoj, feriadoj kaj tiel plu. Aparte akcentindaj estas la ĉiujaraj internaciaj seminarioj de la Studenta Rondo de Esperantistoj en Toruń ĉe la Universitato je la nomo de Nikolao Kopernik, kiujn patronas la vojevodio filia estraro de PEA, plue — la ĉiujaraj feriadoj por geknaboj lernantaj Esperanton. Nunjare, en majo, oni aranĝos unufoje en la bela kastelo en Lubostron tutpollandan feriadon esperantistan.

La esperantistoj en la vojevodio de Bydgoszcz vigle kunlaboras ankaŭ kun pluraj neesperantistaj organizaĵoj — instruistaj, junularaj, skoltaj, tutparte kun la studentaj, per tio ĉi enpenetrigante Esperanton en novajn mediojn.

Ĝuste tiu ĉi kunlaboro kaŭzis, ke la membronombro en la vojevodio filio de PEA en Bydgoszcz dum la lasta jaro kreskis je 80 procentoj kaj egalas nun al 616 presonoj.

Mallonge parolante pri la esperantista agado en la vojevodio de Bydgoszcz, oni ne povas preterlasi la vastan utiligon de la lingvo sur la kampo de turismo. Por siaj membroj la vojevodio filio aranĝadis ekskursojn eksterlanden por esperantistaj aranĝoj, partoprenon en aranĝoj enlandaj. Oni vaste popularigis inter la eksterlandaj esperantistoj la turismajn avantaĝojn de la provinco de Bydgoszcz.

Entute kaj resume: bela, diversflanka agado, bone planata kaj lerte realigata, vasta kunlaborigo de junularo.

La denove elektita prezidanto de la Vojevodio Estraro de la Pola Esperanto-Asocio en Bydgoszcz estas mag. Andrzej Grzębowski.

ANDRZEJ PETTYN

KRAKOVO. La 14 de marto en Krakovo okazis vojevodio raporta-elekta konferenco de PEA. Ĉiu partoprenanto krom bele presita, kolora invitilo, ricevis ankaŭ du cirkulleterojn tre estetike mutobligitajn. En la unua cirkulletero oni skribas pri la direktoj, al kiuj ĉefe celos la agado de la Pola Esperanto-Asocio en la nuna jaro, oni prezentas laborhoraron de PEA por la unua jaruono, kun la koncizaj subĉapitroj: „La taskoj de la Asocio”, „La taskoj de la filioj”, „La taskoj de la Vojevodiaj Filioj”, „La taskoj de la Ĉefa Estraro”. En la dua cirkulletero troviĝas la tagordo de la vojevodio konferenco, Programa referato por la konferenco kaj Perspektiva Laborplano de la Vojevodio Estraro de PEA en Krakovo por la jaroj ekde la 1971 ĝis la 1974. Krom la oficiala parto, okazis ankaŭ arta parto de la konferenco, en kies kadro aktorino de „Teatr Ludowy” („Popola Teatro”) en Nowa Huta, Jadwiga Głębocznicka, prezentis en Esperanto monodramon sub la

titolo „Maria Skłodowska-Curie”. En la internacia lingvo kantis la konata koruso „Orion”. La konferencon partoprenis reprezentantoj de la Ĉefa Estraro de PEA, nome red. Jerzy Uśpieński, la vicprezidanto de la Asocio kaj kasisto, inĝ. Wiesław Tomaszewski.

VARSOVIO. La estraro de la koresponda kurso gvidata de la Ĉefa Estraro de la Pola Esperanto-Asocio decidis pliampleksigi la instruadon per organizo de aparta kurso por progresintoj. Por tiu ĉi kurso oni decidis apliki la mondrenoman, bonegan lernolibron kun progresigaj ekzercoj, prilaboritan de membro de la Esperanta Akademio, William Auld — „Paŝoj al plena posedo”. Ĉi tiu libro estis ĵus reeldonita de „Heroldo de Esperanto” kunlabore kun la Ĉefa Esperanto-Asocio. La koresponda kurso, kiun gvidas la Ĉefa Estraro de PEA, estas nun partoprenata de pli ol 3 mil personoj.

JULIE PEJ-ANOJ FERIAS KUNE

Fariĝis jam kutimo, ke dum ĉiuj junularaj aranĝoj la partoprenantoj diskutas, babilas gaje kaj amuziĝas Esperante, sed lastatempe evidentiĝis, ke inter ni estas ankaŭ kelke da „eternaj komencantoj”, kiuj obstine krokodilas dum niaj aranĝoj, anstataŭ ekzerci sian lingvokonon. Ĝuste por ili, kaj ankaŭ por tiuj, kiuj ŝatas paroli nur esperante, estos organizitaj Perfektigaj Ferio-Kursoj de Esperanto en Swornigacie. La organizantoj: Studenta Esperanto-Rondo en Bydgoszcz kaj Studenta Scienca Esperanto-Rondo en Toruń penas enprogramigi ne nur esperantologiajn prelegojn, konversaciajn ekzercadojn kaj seminariajn okupojn pri metodiko de la Esperanto-instruado, sed ankaŭ instruadon de la Esperanto-kanzonoj, duopadon en kajakoj sur pitoreska lagaro, piedajn ekskursojn tra arbaro kaj multajn distrajn kaj amuzajn aranĝojn. La tuta naturĝuada aranĝo daŭros du semajnojn, nome de la 1 ĝis la 14 de julio; la partoprenkotizo nur 800 zlotoj. La aliĝilojn vi ricevos de Studenta Esperanto-Rondo, Bydgoszcz, strato Koszarowa 9/DS 1. Kontinuigante la tradicion, Studenta Scienca Esperanto-Rondo en Toruń organizas ankaŭ ĉi-jare la III Internacian Esperanto-Feriadon por Mezlernejanoj; ĝi daŭros, kiel lastjare, ankaŭ du semajnojn, nome de la 17 ĝis la 31 de julio. La celo de la Ferio estas: plibonigo de la lingvoscio, ekono de Toruń kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, prilaboro de agadformoj en la Lernejaraj Rondo de Esperanto-Amikoj. La organizantoj prizorgos aranĝon de interesaj ekskursoj, gajaj ludoj kaj partoprenon en la plej interesaj programeroj de la VII Esperanto-Seminario. Por la Feriado ni invitas eksterlandajn kaj polajn gejunulojn. La aliĝilojn bonvolu sendi al: Studenta Scienca E-Rondo, Toruń, Strato Mickiewicza 6/10. La partoprenkotizon — 700 zlotojn — al la konto de SSER: PKO Toruń, 24-9-224.

Ripozante kaj plibonigante vian lingvokonon, vi certe volos partopreni en la III Kultura Festivalo de la Pola Esperanto-Junularo, kiu daŭros de la 17 ĝis la 20 de julio. La programo enhavas: interkonan vesperon, ekskurson al Białowieża (nacia parko) kaj plenan de surprizoj junularan balon. La aliĝilojn akceptas PEA, Białystok, Traugutta 3. La partoprenkotizon, nome 300 zlotojn (escepte de la balo) oni sendu al la konto: PKO Białystok 12-9-632, Oddz. PZE.

Vi certe volos ne nur ĉeesti, sed ankaŭ partopreni en la konkursoj pri jenaj temoj:

1) pri pentro-skulpto-grafiko-arto: „Malfermo de Internacia Ekspozicio”

2) pri fotoarto: „Malfermo de Fotografia Ekspozicio”. (La temo de ambaŭ konkursoj: a) „Homo”,

b) „Monumentoj al la Batalo kaj Martirologio de la Viktimoj la II Mondmilito en la bjalistoka regiono”.

3) pri deklamo: „Deklamo de premilitaj verkoj en konkursoj organizitaj de UEA”.

4) pri E-traduko: „Poezio kaj prozo de bjalistokaj verkistoj”.

5) oratora: „Naskiĝurbo de la kreinto de Esperanto”.

Valoraj premioj atendas!!!

Gajninte kelkajn premiojn ni vojaĝu al Toruń por partopreni en la VII Internacia Esperanto-Seminario. La temo de la nunjara seminario estas: „Kontribuo de poloj al la monda kulturo” kaj konsistas el kvar subtemoj: a) literaturo, b) muziko, c) scienco, d) politiko. Kiel videble laŭ la supre menciitaj subtemoj, temas pri kulturo en la vasta senco.

Por plialtigi la sciencan nivelon, intensigi la laboron, oni iom ŝanĝis la labormetodojn de la seminario. La partoprenantoj estos dividitaj en kvar laŭtemajn grupojn. Ĉiu laborgrupo, gvidata de fakulo, pridiskutos sian temon, antaŭ ĉio la senditajn referaĵojn, kaj elektos la plej bonajn por la ĝenerala konkurso. La organizantoj celas prezenti atingojn de la pola kulturo kaj esplori, kiel vastan signifon ĝi havas en la monda kulturo. Kune, studentoj volas montri, ke Esperanto estas utila por scienco en la internacia medio.

La aliĝilojn oni sendu al Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj, Toruń, strato Mickiewicza 6/10. La partoprenkotizojn (350 zlotojn) oni sendu al la konto: PKO Toruń, 24-9-224, Stud. Koło Naukowe Esp.

Debatinte, diskutinte kaj amuziĝinte la gestudentoj vojaĝos al Toruń por partopreni en Studenta Renkontiĝo-Seminario, daŭranta de la 25 ĝis la 29 de julio 1971.

La seminario havas du ĉefajn temojn: 1) „UNESKO kaj kulturaj, klerigaj kaj lingvaj problemoj de la nuntempa mondo, 2) „Kiel plivigli la stagnantan Esperanto-Movadon?”. La programo, preparita de la Studenta Komisiono de TEJO, Studenta Asocio de Amikoj de UNO kaj Studenta E-Rondo en Bydgoszcz, enhavas: laborojn pri la seminariaj temoj, ellaboron de raporto, rezolucio por la 27 Internacia Junulara Kongreso kaj amuzajn aranĝojn. La prezo de la partopreno en la aranĝo estas 300 zlotoj, la aliĝilojn akceptas Studenta E-Rondo, Bydgoszcz, Koszarowa 9/DS 1).

Membroj de la Fervojojista Sekcio de PEA en Gdansko dum solena festvespero okaze de „Semajno de la Internacia Amikeco”. En la programo de la aranĝo ne mankis monokolektado por rekonstruo de la Reĝa Kastelo en Varsovio

Esperantistoj el la Filio de PEA en Tarnowskie Góry estas ĉiam pli aktivaj en sia poresperanta agado



Mirteloj

Antaŭ nelonge mi estis, okaze de festotagoj, ĉe miaj gekuzoj. Alvenis multaj gastoj, regis gaja humoro, estis multe por trinki kaj manĝi, kaj kiel la ĉefan manĝaĵon oni alportis rostitan meleagraĵon kun mirteloj. Ili estis bonegaj, ĉiuj prenis dufoje.

— Kaj vi, sinjoro profesoro — demandis la mastri-no — vi ankoraŭ tute ne manĝis la mirtelojn. Tio ĉi estas por mi malagraba, ĉar mi mem konfitis ilin. — Bedaŭrinde — ĝemetis la profesoro — mi ne manĝas la mirtelojn.

— Kial? Ĉu eble kuracisto malkonsilis al vi?

— Ho, ne! Tute ne! Sed la mirteloj elvokas ĉe mi malgajan rememoron.

— Rakontu al ni tion!

— La afero ne estas ordinara. Jen ĝi.

Antaŭ dekkelkaj jaroj mi invitis por mia nomtaga festo multajn familianojn, amikojn kaj konatulojn. Ĉiu alportis iun donacon, sed unu el ili estis precipe inĝenia. Li alportis nome kaĝon kun merlo. La merlo estis instruita kaj fajfis diversajn kantojn de mi ŝatatajn. Nenio do miriga, ke baldaŭ inter mi kaj la merlo ligiĝis profunda amikeco. Ni kune fajfis kaj kune manĝis kazeon kaj mirtelojn. Sed la merlo ne ŝatis sidi en la kaĝo. Ĝi preferis flugi tra la tuta ĉambro. Do, ĉiutage, post la reveno hejmen, mi devis kuspi la manikojn kaj purigi la ĉambron. La tuttaga fajfado de la merlo ne plaĉis tamen al la hejmanoj. Post nelonga tempo mi devis do transdoni la merlon al birdoĝardeno. La merlo ricevis apartan vastan kaĝon, ĉe kiu estis tabuleto kun jena surskribo: „Merlo instruita, fajfas malnovajn varsoviajn kantojn. Donaco de profesoro...” — sekvis miaj nomo kaj antaŭnomo. Preskaŭ ĉiudimanche mi iris al la birdejo kaj vizitis la merlon. Mi ĉiam portis por ĝi en bokalo ĝian frandaĵon — dolĉajn mirtelojn. Ĝi rekonadis min jam de malproksime kaj tire fajfis. Ni salutadis unu la alian per ekfajfo, kaj poste ni manĝis la dolĉajn mirtelojn, jen iom ĝi, jen iom mi.

Tiel pasis tri jaroj. Sed iun fojon, reveninte post libertempado mi ekvidis nek la merlon nek la tabuleton. Demandita servistino respondis, ke la merlo mortis antaŭ unu monato. Tiun tagon ĝi senĉese fajfis tire, kvazaŭ ĝi volis min alvoki. De tiam mi ne plu vizitas la birdejon kaj ne manĝas la mirtelojn. — Kaj mi — interrompis iu maljuna grizhara viro — mi havis koncerne la mirtelojn tre, tre agrablajn travivaĵon.

— Rakontu al ni, sinjoro inĝeniero! Rakontu! Ni petas! — vokis ĉiuj.

— Bone. Aŭskultu do.

— Tio, kion mi rakontos al vi, estimataj gesinjoroj, okazis antaŭ preskaŭ 40 jaroj. Mi tiam estis juna, svelta kaj vivplena. Post la lastaj ekzamenoj en la arĥitektura fakultato mi multe ekskursis trans la urbon por regajni la fortojn. Simile okazis iun dimanĉon, someran kaj varmegan. Mi staris ĉe la fenestro de plenplena vagono, kaj apud mi knabino, sorĉe bela. Ŝi estis sola. Ni komencis interparolon, ni trovis komunajn temojn. Kiam ni elvagoniĝis, ni decidis plue ekskursi kune. Ni iris tra arbaro, ni serĉis strobilojn, eksterordinarajn radikojn.

Fine, preskaŭ samtempe, ni elpensis kune la ludon, ke kiu trovos mirtelon ricevos kiel la premion ... kison. Tiam ne estis sezono por la mirteloj, sed malgraŭ tio la premioj ŝutiĝis kiel el plena sako. La ektrovo de mirtelo estis anoncata per gaja ekkrio, poste sekvis pli longtempa aŭ pli mallongtempa elpago de la premio, depende de la grandeco kaj beleco de la mirtelo. Fine, lacaj, ni sidiĝis sur la ŝtupo de pino, ĉirkaŭprenante unu la alian. Subite la knabino ĉirkaŭis mian kolon per la manoj, longe kisis min kaj diris: Karulo! Por la sekva fojo mi invitas vin serĉi... la floron de filiko! Tion dirinte ŝi saltis sur sian lokon, laŭte ekridis kaj malaperis en apudaj arbustoj.

Mi sidis konfuzita ĝis mi eksentis la malvarmon de la vespero kaj ĝis kiam proksima bojado de hundoj ne elŝiris min el la narkotiĝo.

Dum la revena vojaĝo ĉiuj kunvojaĝantoj, rigardante min, ion flustris unuj al aliaj kaj kaŝe ridetis. Ilian konduton eksplikis hejme la spegulo: miaj vanĝoj, frunto, buŝo, oreloj, eĉ la kolo havis la ruĝajn postsignojn de la ricevitaĵaj premioj.

Baldaŭ mi estis vokita soldatservi, poste mi ricevis mian unuan laboron eksterlande. La nekonatan knabinon mi renkontis neniam, sed ĝis nun sonas en miaj oreloj ŝia arĝenteska voĉo kaj kiomfoje mi manĝas la mirtelojn mi eksentas la dolĉecon de ŝiaj varmaj kisoj.

Vivu la knabino! Vivu la mirteloj! Cent jarojn! Je ŝia sano! — kriis ĉiuj.

Nur unu gastino ne partoprenis la ĝeneralan gajan bruon. En la mano ŝi tenis naztukon kaj atente rigardis la vizaĝon de la rakontanto. Kaj fine en ŝiaj okuloj aperis du larmoj.

Eble ankaŭ ŝi havis en sia vivo similan travivaĵon?

GASTE AL ESPERANTISTOJ

La esperantista klubo en Sabadell (Hispanujo) decidis inviti por kelksemajna estado somera kvin esperantistojn eksterlandajn. La sola kondiĉo estas bona kono de Esperanto.

LA XXX KONGRESO HISPANA de Esperanto okazos en Alilance dum la tagoj 19^a—24^a de la venonta julio. Eksterlandanoj estos akceptitaj senpage, sed ili pagos la insignon de la kongreso, en la akceptejo. Adreso de la Kongresa Delegito por tiu ĉi afero: Miguel Manteca, Plaza de los Luceros 7, Alicante (Hispanujo).

OKAZE DE LA DÜRER-JARO 1971 la urbo Nürnberg eldonis artan afiŝon, kiu trovas grandan plaĉon ĉe kolektantoj de tiaj afiŝoj. 200 ekzempleroj de tiu ĉi afiŝo surhavas jenan Esperanto-tekston: Esperanto — ponto al la naciaj kulturoj, Nürnberg invitas vin, Dürer-Jaro 1971. 1 ekz de tiu ĉi afiŝo kostas 4. GM. La prezo entenas la altan koston por afranko kaj skatolo.



En la tuta Pollando, samkiel ĉiun jaron en majo, okazas la tradiciaj dimanĉaj librofoiroj en la kadro de la „Tagoj de la Klerigo, Libro kaj Gazetaro”

RECENZOJ

PREZIDENTO HO CHI MINH (Resuma biografio) eld.: Fremdlingva Eldonejo Hanojo 1970. 153 p. ilustr.

La biografio de la longjara gvidinto kaj heroo de la vjetnama popolo estas prilaborita de Komisiono por Studoj pri la Historio de la Vjetnama Laborista Partio okaze de la 80 datreveno de la naskiĝo de Ho Chi Minh. Tiu ĉi libro fakte ne estas nura biografio de unu homo. Ĝi estas grandparte ankaŭ historio de la vjetnama popolo kaj de ĝia batalo por liberigo kaj kontraŭ la imperiisman agreson.

La libro estas rekomendinda por ĉiuj scivolantoj pri la organizo de la soci-liberigaj movadoj, kaj ankaŭ por tiuj, kiuj interesiĝas pri la nuntempa historio.

(jjm)

POLA ESPERANTISTO — dumonata organo de la Pola Esperanto-Asocio. Adreso de la administracio kaj redakcio: Varsovio, Jasna 6, Pollando. Redakcia Komitato: Jerzy Grum, Jan Klimek, Lech Kosieniak, Wiesław Tomaszewski (redaktoro). Jerzy Uściński. Teknika redaktoro: Joanna Duchnowska. Abonkosto en la okcidentaj valutoj por la tuta jaro (inkluzive la afrankon) — por Eŭropo, Afriko kaj Azio: 1,60 dol.; por Usono kaj Kanado: 2,20 dol.; por Aŭstralio kaj Nov-Zelando: 0,15.3 ang. p. — aŭ egalvaloro en okcidentaj valutoj. La monon oni sendu al — Warszawa, str. Warecka 10, NBP — XII, O/M NR 1534-6-71 menciante la celon de la enpago. Prezo por unu numero 2 rpk.

ACETEBLAJ POLAJ ESPERANTO-ELDONAĴOJ

- A. Pfeffer — „Ĉu vi parolas Esperante?” (konversacioj por la turistoj en E-o kaj pola lingvo) 7 zł
- K. Siwicki — „Internacia elektra, elektronika kaj elektroakustika vortaro (Esperanto-pola-germana-franca-sveda-angla) 25 zł
- K. Brandys — „Kiel esti amata” (la konata rakonto de nuntempa pola verkisto)
- A. Grabowski — „Nova antologio” (poeziaĵoj) — 8 zł
- M. Konopnicka — „Mia poŝhorloĝo. La fumo” — 12 zł
- I. Jabłońska — „La ebria muso” (fabeloj originale verkitaj en Esperanto, taŭgas kiel legaĵo por kursoj) — 7 zł
- W. Reymont — „La lasta” (rakonto en la klasika traduko de KABE) — 5 zł
- K. Kalocsay, G. Waringhien, R. Bernard — „Parnasa gwidlibro” (esperanta poetiko) — 50 zł
- R. Dobrzyński — „Kantante tra Pollando” (kantareto de polaj popolaj kantoj, plejparte el la repertuaro de la konataj ensembloj de kanto kaj danco „Mazowsze” kaj „Śląsk”, aranĝita por 2, 3 aŭ 4 voĉoj) — 12 zł
- Z. Wójcikiewicz — „El la vojaĝo tra Eŭropo” (fotoalbumeto kun priskriboj de pola esperantista karavano, kiu vojaĝis al UK-oj) — 10 zł
- K. Tymiński — „Pola-esperanta vortaro” — 40 zł
- K. Smoleń — „Auschwitz” (gvidlibro tra la Muzeo, troviĝanta en la iama koncentrejo) — 15 zł
- A. Pettyn — „Ĉu vi parolas Esperante?” (disko-kurso de E-o, konsistanta el kvar longludantaj diskoj kaj akompana lernolibro; pro la fakto, ke sur la diskoj estas registritaj nur esperantlingvaj dialogaj tekstoj — ĝi estas facile uzbla en kiu ajn lando; strukturisma metodo; legas la plej bonaj parolistoj de la Pola Radio, kiuj estas samtempe bonegaj esperantistoj) — 176 zł

ATENTON! Ĉiujn supre menciitajn eldonaĵojn la eksterlandanoj povas aĉeti pere de „Ars Polona”, Varsovio, Krakowskie Przedmieście 7, Pollando

DEZIRAS KORESPONDI HUNGARUJO

● 5 geesperantistoj deziras korespondi kun polaj esperantistoj. Skribu al: **Esperanto-Grupo**, Turkeve sfjusagikaz, Hungarujo

GDR

● Komencanta esperantisto, instruisto, amas naturon, sporton, vojaĝojn, kolektas poŝtkartojn, Rudolf **Proschek**, Schlstr. 7, 2204 Zussow, DDR

RUMANUJO

● Komencanta esperantisto deziras korespondi pri diversaj temoj, serĉas amikojn en la tuta mondo, inĝ. Vasti **Iom**, str. Suceva nr 6, bloc 5 A, Scara D, apart 101, Constanta, Rumanio

SOVET-UNIO

● 18-jara studentino deziras korespondi kun la tuta mondo, pri vivo, arto, literaturo, naturo kaj turismo, Valia **Mijmrina**, str. Vagonnaja 7 kv. 25, Perm — 67, USSR

POLLANDO

● Komencanta esperantisto, 36-jara — kun polaj aŭ eksterlandaj geinstruistoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto kaj lernas ĝin mem, interesiĝas pri psikologio kaj instruado de matematiko en la elementaj lernejoj, Kazimierz **Grzelok**, skr. poczt. 62, Katowice 6, Pollando

● Studentinoj de geografio, volus korespondi kun esperantistoj, interesiĝas pri vivo en aliaj landoj, interŝ. bk. kaj diskojn, Halina **Dziedzic**, ul. Nowolipki 23/70, DS „Olimpo”, Kraków, Pollando

● S-ro Zbigniem **Tomanek**, intrŝ. E-librojn, skribu, kiujn librojn vi havas por interŝanĝo, ul. Wspólna 42/1, Elbląg, Pollando

POLA ESPERANTISTO (Esperantysta Polski) — du-miesięcznik Polskiego Związku Esperantystów; Warszawa, Jasna 6 (tel. 27-82-67). Prenumeratę na kraj przyjmują urzędy pocztowe, listonosze oraz Oddziały i Delegatury „Ruchu”. Można również dokonywać wpłat na konto PKO Nr 1-6-100020 — Centrala Kolportażu Prasy i Wydawnictw „Ruch”, W-wa, Towarowa 28. Prenumeraty przyjmuje się do 15 dnia miesiąca poprzedzającego okres prenumeraty. Cena prenumeraty rocznej — 36.— zł. Prenumeratę na zagranicę, w wysokości 50,40 zł rocznie, przyjmuje Biuro Kolportażu Wydawnictw Zagranicznych „Ruch”, Warszawa, Towarowa 28, tel. 20-46-88, konto PKO Nr 1-6-100024.

Blovorkestroj

(Orkiestry dĉete)

Muziko: W. Rzeczkowska
Pola teksto: J. Stanisławski
Tradukis: A. Vizgirdas (Litovia USSR)

Pa-pa-pa
pa-pa-pa-pa-pa-pa-pa,
Pa-pa-pa
pa-pa-pa-pa-pa-pa;
Pa-pa-pa
pa-pa-pa-pa-pa-pa-pa;
Pa-pa-pa-pa-pa.

1. Pro neni'
jen komenciĝis ĉio,
(Pro neni'
nur simpla pa-pa-pa;
Blovorkestr'
enhavas forton ian —
(Pravas tiu fakt':

(Sur balkon' avino staris,
Avo strate defiladis,
Ekvidinte tion
Perdis ŝi konscion —
Nepris sobra ŝin refari.

Tuj la avo paŝeraris
Sente de instigo ia

Al balkon' sin ŝovis,
Per trombon' ekblovis —
Jen komenco estis tia.

Pa-pa-pa
...

2. Pro neni'
jen komenciĝis ĉio,
Pro neni'
nur simpla pa-pa-pa;
Blovorkestr'
enhavas forton ian —
Jen pli nova fakt':

Sur balkon' patrinjo staris,
Paĉjo strate defiladis,
Ekvidinte tion
Perdis ŝi konscion —
Nepris sobra sin refari.

Tuj la paĉjo paŝeraris
Sente de instigo ia
Al balkon' sin ŝovis,
Per trombon' ekblovis —
Ripetiĝis historio.

Pa-pa-pa
...

3. Pro neni'
jen komenciĝis ĉio,
Pro neni'
nur simpla pa-pa-pa,
Blovorkestroj
kaj la fort' ilia
Mankas nun — jen fakt':

Sur balkon' mi vane staras,
Por ke iu defiladu —
Por ke mi pro tio
Perdu tuj konscion,
Ke min oni sobra faru.

Por ke iu paŝeraru,
Kiel ili ambaŭ iam,
(Kaj al mi sin ŝovu,
Per trombon' ekblovu —
Por ke plenumiĝu ĉio!...

Pa-pa-pa
...

Marŝe

The musical score for the march 'Marŝe' is written in 4/4 time and consists of ten staves. The melody is primarily in the treble clef, with some bass clef staves for accompaniment. The score includes first and second endings, marked with '1.' and '2.' respectively. The key signature changes from one flat (B-flat) to one sharp (F-sharp) in the latter half of the piece. The music features a mix of eighth and sixteenth notes, often beamed together, and rests. The piece concludes with a double bar line.